Germany.—A group of eight Swedish students visited the principal towns in August, creating much public interest by the practical demonstration of the utility of Esperanto. Courses in Berlin and Dresden were resumed in September with large attendance. Reports from twenty-two clubs are printed in the October *Germana Esperantisto*. A fine catalogue, issued by the largest continental manufacturers of photographic supplies, may be received on request from the firm: Huttig A.-G., Dresden-Streissen, Schandauerstr. 76.

LITERATURO

LA ELEKTO DE LEGINDAJ VERKOJ.

Esperante verkita de *Clarence L. Dean.*

KONSENTOS ĉiu ke legado havas grandan influon sur la penso. Tiu, kiu kutime legas seriozajn verkojn, nepre havos seriozajn pensojn; tiu, kiu legas nur malpezajn, flugfoliajn skribaĵojn, nature pensos malserioze. La grandaj aŭtoroj, kiuj pritraktas la vivon laŭ altmoralaj principoj, donos al la leganto la povon konsideri vivon laŭ morala vidpunkto, kaj la aŭtoroj, kiuj ĉiam ŝercas pri ĉio, inspiras en la animo de tiu, kiu nenion alian legas, la kutimon vidi ĉion ŝerce. Sed la influon de legado sur la karaktero mi ne deziras tie ĉi pritrakti. Nur ĝia influo sur stilo, kaj aparte esperanta stilo, estas la nuna demando.

Dum miaj akademias tagoj nia profesoro de angla literaturo ofte kaj longe insistis ke dum kelke da tempo antaŭ ol skribi la tezojn por la duonjaraj konkursoj, la lernantoj legu nur unu aŭ du elektitajn aŭtorojn, kaj ke tiuj aŭtoroj estu zorge elprenitaj el la eble plej bonstilaj anglaj verkistoj. Tiu profesoro havis tre grandan admiron por la verkistoj uzintaj la plej simplan kaj rektan stilon kaj malgrandajn, simplajn anglosaksajn vortojn, kaj lernanto ne povus pli plaĉi al li, ol zorge kaj kutime legi la verkojn de Charles Lamb, Addison, Steele kaj Irving. Sed, foje, kiam iu devis partopreni en oratora konkurso, li konsilis la forlason de tiuj kvietaj aŭtoroj kaj la legado de Macaulay, Burke, Webster kaj aliaj aŭtoroj havantaj pli sonorajn stilon kaj impresajn periodojn. Pri la influo de la legado de la plej bonstilaj anglaj verkoj sur la stilo de la lernantoj, eĉ malgraŭ la konkurenco de la ĉiutaga interparolado, li neniel dubis. Kaj efektive li grande prosperis per sia sistemo, kaj multaj el liaj lernantoj poste fariĝis konataj verkistoj, kaj simpla,

klara, esprimplena, efektiva stilo ĉiam estis marko de la laŭreatoj de tiu akademio.

Se bonaj aŭtoroj anglaj havas tiom da influo sur angle-parolantaj knaboj, ĉe kiuj la malbona influo de la nezorga ĉiutaga interparolado kontraŭstaras la efikon de la legado, kiom pli da efikeco la legado de la plej bonstilaj verkistoj esperantaj havas por formi la stilon de esperantaj lernantoj, ĉe kiuj la bedaŭrinda influo de nezorga interparolado nepre faras sin malpli sentata, tial ke tia interparolado estas malpli konstanta, kaj malpli nezorga. Sed la demando kiun ni novaj esperantistoj ĉiam proponas estas: Kiuj estas la plej legindaj verkoj pro ilia stilo? Kiel oni povas elekti la bonstilistojn, por ke oni legu nur iliajn verkojn? El la multaj libroj, kiuj jam eldoniĝis, kaj nun eldoniĝas, ni estas certaj ke ne ĉiuj estas bonaj. Ni ne havas la tempon por legi ĉiujn, kaj eĉ se ni ĝin havus, leginte ĉiujn eldonitajn verkojn, la malbonajn kun la bonaj, ni perdus la profitan efikon de la legado, ĉar, ne sciante kiuj estas la bonstilaj, ni ne havus la eblon malelekti la malĝustajn kaj maloportunajn vortojn kaj esprimojn, kaj enmeti en la memoron nur la bonajn. Kaj eĉ se ni havus tiun povon, estus necese ke ni estu, ne novebakitaj, sed spertaj esperantistoj, kun tute perfektitaj kutimoj de pensado kaj skribado, por ke miksitaj legado de naperemaj verkistoj ne difektu nian stilon. Estas malnova proverbo ke malbonaj kunuloj difektas bonajn morojn, kaj nenie estas tio pli vera ol en la legado de senlertaj kaj nepenemaj aŭtoroj. Kio, do, estas nia kriterio? Kiel ni elektos tion, kio estas bona, kaj evitos tion, kio estas malbona?

Nu, ni havas tre fidindan gvidon en nia majstro. Tiu, kiu elpensis la lingvon, estas ĝis nun la plej instruita pri ĝiaj nuancoj, kaj la plej sperta por ĝia uzado. Komencu ni, sekve, atentante liajn vor-

tojn: En la antaŭparolo de la *Fundamenta Krestomatio*, li diris klare tion, kio estas, laŭ lia opinio, la vera fonto de la lingvo Esperanto pura kaj nedifektita, kaj tio estas la *Fundamenta Krestomatio*. "Estas dezirinde," li diris, "ke ĉiu, antaŭ ol komenci la legadon de la esperantista literaturo, tralegu atente la *Fundamentan Krestomation*. Ne deprezante de la lernanto la eblon kritike proprigi al si ĉiujn riĉigojn kaj regule faritajn perfektigojn, kiujn li trovas en la literaturo, la *Fundamenta Krestomatio* por ĉiam gardos lin de blinda kaj senkritika alproprigo de stilo erara." Oni ne povas tro insisti pri tiu punkto. Estas ĉiam tre bona kutimo ofte tralegi kaj relegi la *Fundamentan Krestomation*. Unuj porcioj estas pli interesaj ol aliaj, kaj eĉ al mi ŝajnas ke unuj estas pli valoraj ol aliaj; sed la majstro aprobas ĝin tutan. Mi trovas la porciojn skribitajn de Dro. Zamenhof mem pli interesaj kaj valoraj ol multaj aliaj, sed, memorante lian aprobon, levu ni zorge ankaŭ la aliajn. Aparte rekomendinda estas la ofta legado kaj eĉ la parkera lernado de la antaŭparolo kaj de la artikoloj pri Esperanto. Se oni dezirus kontroli sian komprenon de la senco de la mirinda traktato pri la esenco kaj la estonteco de la lingvo internacia, oni ne povus pli bone agi ol kompari ĝin kun la bonega angla traduko de Sro. A. E. Wackrill.

Mi estas unu el tiuj, kiuj ŝatas la Ekzercaron por la legado, kaj mi pensas ke ĉiu esperantisto, eĉ sperta, devas apliki la konsilon de Dro. Zamenhof pri la *Fundamenta Krestomatio* ankaŭ al la *Ekzercaro*. Pri la senco de vortoj, la oportuno de kunmetaĵoj, la ĝusteco de esprimoj kaj la eleganteco de frazoj, oni konsultu la vortarojn, la gramatikojn kaj la sintaksojn, se oni tiel volas. Sed ne forgesu ni ke funde ĉiuj aŭtoritatoj esperantistaj ĉerpas la pli grandan parton de siaj informoj kaj spertuleco, se ili estas bonaj fidindaj, el la *Ekzercaro* (*La Fundamento*) kaj la *Fundamenta Krestomatio*. Oni tre volonte konsentas ke multe de bona esperantista skribado troviĝas ekster tiuj ĉi du verkoj, sed estas aksiomo, kiun ni ne devas forgesi, ke ĉio, kio estas kontraŭ tiuj ĉi du verkoj estas

malbona Esperanto. Sekve ne estas eble tro ofte tralegi aŭ tro zorge studi ilin.

Sed eĉ se ni faras nian devon al la lingvo kaj al ni mem, kaj tralegas ofte kaj zorge la *Ekzercaron* kaj la *Fundamentan Krestomation*, ni bezonas legi aliajn verkojn. Se oni legas nur la bonan, oni ne povas tro legi. Mi mem sentas min ne tute feliĉa, ne leginte ĉiusemajne almenaŭ unu novan libron, kaj, ĉar mi deziras akiri la eblon pensi esperante, kiel mi pensas angle, mi penas legi pliparte esperantajn librojn. Sendube aliaj sentas similan bezonon. Kiel, do, elekti tiujn librojn, kiuj ŝekvos tiujn ĉi du? Nu, komence, aliĝu ni al Dro. Zamenhof. Tiu estas sendanĝera. Sed kiu el liaj verkoj estas la plej ŝatinda? Ĉar necese ĉiuj ne estas samvaloraj. Oni kutime citas *Hamleton*, kiel la plej ŝatatan verkon de nia majstro. Mi ne mallaŭdas tiun altvaloran verkon, sed mi trovas aliajn pli utilaj kaj eĉ pli legindaj. Por la lernantoj, kaj eĉ por la novaj esperantistoj, kiuj jam sentas sin ne plu lernantoj, mi pensas ke la tute plej bona verko el ĉiuj ankoraŭ produktitaj en nia kara lingvo estas *Marta*, tradukita el la pola lingvo de nia majstro, kiu nun enpresitiĝas en la *Revuo*, kaj kiu estos sendube baldaŭ represita kiel aparta eldonaĵo. La stilo de *Marta* estas tiel klara, kaj simpla, kaj samtempe tiel esprimplena, ke oni ĉiam, mi pensas, rigardos ĝin kiel modelon. La dialogoj kaj priskriboj estas plenaj je ĉiutagaj parolturnoj kaj popolaj frazoj la plej utilaj. Tamen ĉio estas kiel eble plej bonstila, kaj tiel vive rakontita ke oni vidas ĝin antaŭ siaj propraj okuloj. La romano estas plena je intereso. Oni ne povas sekvi la historion sen bedaŭro ke tia valora verko ne pli frue venis en siajn manojn. Post *Marta* mi ŝatas pro la stilo la tradukon de *Georgo Dandin*. Mi scias ke tiu ne estas unu el la plej famaj verkoj de la glora Molière, sed mi speciale rekomendas ĝin, pro tio, ke la stilo estas tiel simpla kaj rekta, kaj la parolturnoj tiel signifplenaj. Ŝajnas al mi, ke la stilo de nia majstro fariĝas konstante pli simpla, pli signifa. En ĉiuj lastaj verkoj liaj troviĝas la samaj admirindaj kvalitoj. Nun, post tiuj ĉi simplastilaj kaj interesplenaj verk-

oj, legu ni la du grandajn klasikajn librojn, *Ifigenio en Taurido* kaj *La Predikanto*. Kaj post tiuj ĉi *Hamleton*. Tre sperta kaj konata Brita Esperantisto lastatempe, ĵus antaŭ la apero de *Marta*, diris al mi, ke *Ifigenio* estas la plej bona verko de la majstro ĝis tiam aperinta.

Sendube aliaj konsilus legi ĉiujn verkojn de Dro. Zamenhof, sed mi malkaŝe konfesas, ke mi ne egale ŝatas ĉiujn liajn tradukojn. Mi ofte bedaŭras ke li ne skribis originalajn verkojn. Liaj leteroj kaj paroladoj estas tiel mirindaj, ke oni nature deziras legi la originalajn pensojn de homo, kiu tiel klare rezonas kaj tiel ĝuste kaj bonstile esprimas siajn pensojn. Liajn leterojn kaj paroladojn mi relegas ofte, kaj ŝatas ilin pro la stilo pli ol kelkajn liajn tradukojn. Ni estas instruitaj ke la bona esperanta tradukisto ĉiam tre fide sekvas la stilon, eĉ la parolturnojn, de la originalo. Nu, mi ofte trovas tiujn ĉi parolturnojn kaj la neklarajn stilon de la aŭtoroj tradukitaj tedar kaj malplaĉaj. Ekzemple, tre malfacile kaj malrapide mi sekvas partojn de *La Revizoro* kaj de *La Rabistoj*, kaj mi ne rekomendas ilin al lernantoj kiel modelojn de klara esperanta stilo. La Germanaj parolmanieroj ne estas ĉiam rekomendindaj laŭ vidpunkto de klareco kaj simpleco. La rusa stilo mi konas nur per tradukoj, sed ŝajnas laŭ tiuj ke ĝi devas havi multe de neŝatindaj idiotismoj. Aliaj, mi pensas, jam sentis tiun saman kiel mi pri tiuj ĉi du verkoj, ĉar en la *Revuo* de Oktobro, 1907, Dro. Zamenhof diras "pri miaj lastaj verkoj," ke, "se la stilo ne estas popola, kaj se kelkaj esprimoj ne estas klare kompreneblaj, estas la kulpo de la aŭtoro mem, kaj ne de la tradukanto, kies devo estas fidele traduki." Bone! Sed mi deziras legi bonan esperantan stilon, almenaŭ komence, kaj ne imitaĵojn de malklara germana, rusa, franca, angla aŭ alilanda nacia stilo. Mi ne plendas pri Dro. Zamenhof, sed pri la aŭtoroj de li tradukitaj, kaj komence mi preferas legi aliajn, pli klarajn verkojn. Estas tre bone ke ni sciigu al ĉiuj ke Esperanto taŭgas por traduki tiajn verkojn, kaj ke ni havu tiajn tradukojn, sed mi pli ŝatas librojn skribitajn en la plej klara kaj bona esperanta stilo.

Post Zamenhof, kiu?

(Daŭrigota)

LA NAZO.

Laŭ la franca de Voltaire tradukis por *La Verda Standardo* L. Masquelier.

Foje Azora revenis de promenado tute koleranta kaj ĵetanta grandajn ekkriojn.

"Kio," diris al ŝi Zadig, "okazis al vi, mia kara edzino? Kio povis vin tiel ekscitegi?"

"Ho ve!" ŝi diris, "vi estus kiel mi, se vi estus vidinta la spektaklon ĉe kiu mi ĵus ĉeestis! Mi iris konsolonta la junan vidvinon Kosron, kiu ĵus konstruis, de du tagoj, tombon al sia juna edzo; apud la rivereto, kiu tiun ĉi herbejon limigas. Si promesis al la dioj, pro sia doloro, restadi apud tiu tombo tiel longatempe, kiel la akvo de tiu ĉi rivereto apud ĝi fluas."

"Nu," diris Zadig, "jen estas estiminda edzino, kiu vere amis sian edzon."

"Ho," diris Azora, "se vi sciус kion ŝi faris, kiam mi ŝin vizitis!"

"Kion do, bela Azora?"

"Si deturnigis la rivereton!"

Azora kriadis tiel longajn insultojn, ĵetis riproĉojn tiel perfortajn kontraŭ la juna vidvino, ke tiu ĉi lukso de virto ne plaĉis al Zadig.

Li havis amikon nomatan Kador, kiu estis unu el tiuj junuloj ĉe kiu lia edzino trovis pli grandan honestecon kaj meriton ol ĉe la ceteraj; li konfide sin turnis al li kaj fideligis lin tiom, kiom li povis, per grandega donaco. Azora pasiginte du tagojn ĉe amikino sur la kamparo, revenis la trian tagon hejmen. Plorantaj servistoj anoncis al ŝi, ke ŝia edzo subite mortis la nokton mem; ke oni ne kuraĝis alporti al ŝi tiun malfeliĉan sciigon, kaj ke oni ĵus entombigis Zadig en la tombon de liaj prapatroj, ĉe la fino de la ĝardeno. Si ekploris, elŝiris siajn harojn, kaj ĵuris, ke ŝi mortos. La vesperon, Kador petis permeson paroli kun ŝi, kaj ambaŭ ploradis. La sekvantan tagon, ili malpli ploris kaj tagmanĝis kune. Kador konfide sciigis al ŝi, ke lia amiko testamentis al li la plimulton de siaj bienoj, kaj delikate komprenigis, ke li estus feliĉa, se li povus kun ŝi dividi sian riĉecon. La sinjorino ploradis, ekkoleris, kvietigis; la vespermanĝo estis pli longa ol la tagmanĝo; oni pli kon-

fide interparoladis. Azora laŭdis la mortinton, sed ŝi konfesis, ke li havis malbonecojn, kiuj ne estas ĉe Kador.

Meze de l'manĝado, Kador ekplendis pro fortega doloro de lieno; la sinjorino, malkviete kaj zorgeme rapidante, alportigis ĉiujn oleojn, per kiuj ŝi parfumas lin, por provi ĉu iu el ili efikos por la liendoloro.

"Ĉu ofte vin atakis tiu ĉi kruela malsano?" ŝi diris kompateme.

"Kelkfoje ĝi min alkondukas ĝis la bordo de l'tombo," respondis Kador; "kaj nur unu kuracilo min povas kvietigi: almeti sur mian flankon la nazon de viro mortinta la antaŭan tagon."

"Jen estas stranga kuracilo, diris Azora."

"Ne pli stranga," li respondis, "ol la saketoj de l'sinjoro Arnon, kiuj kontraŭstaras la apopleksion."

Tiu ĉi argumento, aldonita al la grandega merito de l'junulo, fine decidigis la sinjorinon.

"Nu, ŝi diris, kiam mia edzo pasos el al hieraŭa mondo en la morgaŭan mondon sur la ponto Tchinavar, ĉu la anĝelo Asrael malpli permesos al li pasi tial, ke lia nazo estos iomete malpli longa en la dua vivo ol en la unua?"

Ŝi do alprenis razilon, kaj iris al la tombo de sia edzo, ĝin malsekigis per ploroj, kaj alproksimiĝis por eltranĉi la nazon de Zadig, kiun ŝi trovis tute kuŝanta en la tombo. Releviĝas Zadig, tenante sian nazon per unu mano, kaj per la alia haltigante la razilon.

"Sinjorino," li diris, "ne kriadu plue tiele kontraŭ la juna Kosron: la projekto eltranĉi mian nazon tute egalas la deturnigon de la rivereto."

LA PENTRAĴO DE LA REĜO.

Tradukis el angla lingvo *Laura G. Moore*
La reĝo de la konsilejo venis laca kaj korenuja; li vokis por Hiĉ, la pentristo, kaj aparte parolas al li:

"Mi estas enuigita de vizaĝoj malnoblaj, hipokrituloj, malkuraĝuloj, friponoj! Mi malleviĝos ĝis ilia vico, sklavestro en reĝlando de sklavoj! Pentru por mi pentraĵon de reala viro, gracia kaj

saĝa kaj bona; plena je la forteco de herooj kaj la beleco de virineco. Ĝi pendos en mia plej privata ĉambro, por ke tie, kiam mi eniras, ĝi povos pleniĝi mian animon per sia beleco, kaj varmigi ĝin per sankta fajro."

La artisto do pentris la pentraĵon, kaj ĝi pendiĝis en la palaca ĉambro; neniam io tiel bela ornamis la belegan muron. La reĝo, kun kapo malkovrita, rigardis ĝin kun muta raveco, ĝis ĝi subite ekprenas strangan signifon, kaj ne respondas lian demandantan rigardon.

La formo estas tiu de lia plej fleksema kortegulo, perfekta lau ĉiu membro; sed la sintenado estas tiu de paĝio kiu pleniĝas la botelegojn por li; la brovo estas tiu de pastro kiu legadas siajn pergamenojn frue kaj malfrue; kaj la okuloj, tiuj de vaganta kantisto, kiu kantis ĉe la palaca pordego. La lipoj, duone malgajaj, duone ridemaj, kun dece tremema gracio, estas la lipoj de virino, kiun li kisis en la vendejo; sed la rideto kiu la lipojn plibeligas, kiel rozo kun brilo de roso, estas la rideto de la edzino kiu lin amas, Reĝino Ethelyn, bona kaj fidela.

"Sciigu do, ho reĝo," diras la artisto, "ĉi tiun veron ke la pentraĵo diras—ke en ĉiu formo homa io dia loĝadas; ke serĉante ĉiun vivantan templon por la loko kie la vualo estas travidebla, ni povas atingi per belaj videtoj la formon de la dio interne."

AZENO EN LA FELO DE LEONO.

Azeno iam trovinte la felon de leono, kiun ĉasistoj lasis en la brilo de la suno por ke ĝi sekiĝu, metis ĝin sur sin kaj iris al la vilaĝo kie loĝis lia posedanto. Ĉiu homo kaj besto forkuris ĉe lia proksimiĝo, kaj li estis tiun tagon azeno fiera. Por esprimi sian ĝojon li do blekegis per lauta voĉo, sed tiam nature ĉiu ekkonis lin, kaj lia posedanto venis kaj forte bategis lin per bastono pro la timego kiun li kaŭzis. Kaj post nelonge vulpo proksimiĝinte diris al li: "Ha, mi rekonis vin per via voĉo."

— CHAS. E. BAKER.

BARCELONA CONGRESS NOTES

(Omitted from November for lack of space.)

Barcelona is larger than St. Louis in population, but much smaller in area. The town actually seemed filled by our thirteen hundred Esperantists—everywhere Esperanto flags, Esperanto badges. We were “spotted” from afar by vendors of post cards, souvenirs, daily papers and “keys.” Every restaurant orchestra, of which there are about four million in the town, played “La Espero,” well knowing that the hat would not be passed in vain. Much to the regret of the organ grinders, that classic has not yet been added to their repertory, but in recognition of our liberal ideas they gave us infinite repetition of the “Mar-seillaise.”

Possibly the children of the Barcelona streets do not know Esperanto, but they certainly know the meaning of the word and will recognize the Green Flag next time they see it. No matter how obscure and dark and narrow and dirty the street we turned into, the little fellows would remark to each other “*Los Esperantistos!*” as we passed by.

Selling Cefeê “Esperanto Keys” for ten centimos (two cents) is not hard work for a strong man, and several of them were thus occupied on the Rambla of the Flowers.

“Esperanto sounds just like Spanish” can mean nothing but that its pronunciation is beautiful and musical. You would never get tired of hearing the street book agents of Barcelona sing: “*Llena gramatica para aprender el Esperanto!*”

If a Chicago policeman were to be as polite and gentlemanly for one hour as the City Guardsman of Barcelona is at all times, he'd either be starring in a museum the next day or be run over by an auto truck whose driver had fainted from surprise.

Some enterprising “ad” man was responsible for the wholesale free distri-

bution of daily programs of the Esperanto Congress in the form of a green paper flag. These were given out from the newspaper kiosks every morning and formed an attractive proof of attention to details.

The Congress had a daily organ in *La Publicidad*, one of the leading papers. Besides articles in Esperanto, this paper printed in Spanish a full report of the Congress. The fact that anybody who has learned Esperanto can with little difficulty read Spanish is another of the many reasons for knowing the international language.

Every book store in Barcelona had a display of Esperanto text-books.

People who endorse the encroachments which the police of certain American cities have made upon the right of free speech ought to go to Spain. Protestant church services could not be mentioned in the official program, which had to be vised by the censor at Madrid, and the time and place of the socialist meeting was communicated in whispers.

Certain enemies of Esperanto have stated that the language “lost its grip” in Dresden after last year's congress. Oh, that it would suffer a similar loss in every city! A Dresden lady won the prize in the Floral Games at Barcelona. A big Dresden manufacturing house (photographic supplies) was on the spot with a large and elegantly printed catalogue in Esperanto, and since the congress there last year a firm has been incorporated for the manufacture of Esperanto specialties. It filled two large rooms in Barcelona with a display of art and novelty work such as had been seen at no previous congress, and the representative stated that they had not as yet “started.” They have plenty of capital and plenty of confidence in Esperanto.

PAGO MALSERIOZA

La plimulton el tiuj ĉi oni elĉerpis el *La Spritulo*, esperanta gazeto de ĉercoj, eldonata ĉiun sessemajnon. Jarabono, 60 cendoj, ĉe Richard Bresch, Kornerstrato 31, p., Leipzig, Germanujo.

Instruisto (al malgranda Karlo): "Se ci prenos katon kaj en mallumo strekos ĝian felon per mano je kontraŭa direkto, kio do eksaltos en cian vizaĝon?"

Karlo: "La kato!"

"Vi impertinenta persono! En la bankuvo estas ja temperaturo de 95 gradoj kaj ĉu en tia varmega akvo vi banas la infaneton?"

"Eh, kion do scias tiel malsaĝa kaj eta kreitaĵo pri la temperaturo!"

"Kion vi do ludas, infanoj?"

"Ni ludas 'patro kaj patrino.'" "

"Kie do estas Friĉjo?"

"Friĉjo ĝis nun ne estas en la mondo, li estas tuj naskiĝonta!"

A. estas por resaniĝo en marbanejo, kaj ricevis leteron de sia edzino kun la vortoj: "Alfredo, restu fidela al mi!"

Tuj li telegrafas: "Bedaŭrinde ne ĝustatempe ricevis la leteron."

Servistino baldaŭ forlasonta sian servadon, ekpetis ke oni pagu al ŝi. Oni pagis, ŝi kalkulis la monon, trovis ĝin preciza kaj elirante ĵetis du frankojn al la hundo.

"Kial vi lasis monon al la hundo?" demandis la domomastro.

"Ĉar, ĝis kiam mi servis ĉe vi, ĝi purigis la manĝilaron," respondis la servistino.

Infano: "Mi petas, donu al mi polvon por puloj!"

Apotekisto: "Por kiom?"

Infano: "Ha, mi ne estas kalkulinta ilin."

Dum la junaĝo *Silero* lernis la ludadon sur harpo. Lia najbaro, nekontenta de liaj muzikaj ekzercoj, diras al li iun tagon:

He, Sro. *Silero*, vi ludas kiel Davido, nur ne tiel bone.

Kaj vi, respondas *Silero*, parolas kiel *Solomono*, nur ne tiel saĝe.

Greko fanfaronis kun la supereco de sia popolo.

El Grekujo—diris li—estas elirintaj ĉiuj saĝuloj kaj filozofoj.

Tial nun tie ne estas eĉ unu! respondis mi.

La estrino en la lernejo skribis le sekvantan sentencon sur la nigratavolo, kaj demandis ke oni ĝin korektu: "La ĉevalo kaj la bovino estas super la kampo."

Longatempe neniu respondis kiam subite junulaĉo levis la manon kaj elparolis fierege—

"La bovino kaj le ĉevalo estas super la kampo—sinjorinoj unue ĉiam!"

Oficejstro severe aliproĉas unu el siaj subuloj: "Mi estas devigata vin translokigi," li diras; "ne nur vi dormas en la oficejo, sed ankaŭ vi ronkas, kaj tio revekas ĉiunmomente nian ministrejan fakestron, kiu laboras en apuda ĉambro."

La fiŝvendistino: "Ĉu vi freneziga, Sinjoro, ke vi alparolas miajn fiŝojn?" "Tute ne, Sinjorino, nia konversacio estas ja tre interesa." "Pri kio vi ilin demandas?" "Pri novaĵoj de la rivero." Kaj kion ili respondas? Ili respondas ke ili ĝin forlasis de tro longa tempo por min sciigi.

Kiun momenton oni elektas prefere por rikolti la ĉerizojn? La momenton, kiam la hundo estas alligita, kaj la mastro foririnta.

CLASSIFIED ADVERTISING

Rate per line.....10 cents
Minimum charge.....20 cents

Prezo po linio.....\$d. 20
Minimuma sumo.....\$d. 40

FAKO DE KORESPONDADO

KLARIGO KAJ REGULOJ: La signo **P** montras, ke oni volas nur poŝtkartojn vidaĵajn; la signo **L**, nur leterojn. Sen signo, aŭ leterojn. Tiom da amerikanoj volas fremdajn korespondantojn, ke ni enpresas senpage adresojn de eksterlanduloj. Kiam vi akribas dudek personojn, ne esperu pli ol dek kvin respondojn. Ĉar eĉ esperantistoj estas nur homoj.

UNITED STATES

- P** Frank Judson, 764 E. 40th St., Chicago, Usono.
P Fred Loyce, 8841 Elmwood Ave., Chicago, Usono.
C Chester C. Camp, Corning, Iowa, deziras interŝangi La Revuon aŭ Oficalan Gazeton Esperantiston por Internacia Sciencia Revuo.
E Elmer Johnson, 169 Galena Street, Aurora, Ill.
W Walter Bennett, 301 Eighth Ave., Homestead, Pa.
E Earl Stratton 122 East 3rd Street, Jamestown, N. Y.
P Fno. Grace Randolph, Niagara Falls, N. Y.
P Fno. Mary MacDonald, Oakville, Ont., Canada.
P Melvin T. Keller, Belington, West Va.
P Frank Bohac, Ph.G., Howells, Neb.

FOREIGN—EKSTERLANDA

ALGIERS.

Grupo esperantista volas korespondi per ilustritajn poŝtkartojn kun nefrancaj esperantistoj. Adresu Gaston French, sekretario Grupo Esperantista, Philippeville, Algiers.

AUSTRIA.

- P** Eugen Esterak, M. Ostrava, Moravia, Austria.
J Josef Polaczek, Prag VIII, Primatorenstrasse 601, Austria.
Sro. K. Ratzka, Ostrawitz, Moravia, Austria.
Sro. Karel Kotek, Tylowa ul. Kromeris, Moravia, Austria, volas interŝangi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.
Sro. Jan Korinek, Oplocany u. Tovacova, Moravia, Austria, deziras interŝangi sekajn kreskaĵojn kaj insektojn aŭ korespondi pri tiuj objektoj. Okaze angle, france kaj germane.
Sro. Vlascl, Hruska u. Kojetina, Moravia, Austria.

BELGIUM.

Volas korespondi per poŝtkartaj vidaĵoj kaj poŝtmarkoj, kaj ĉiam respondo, Viktor Moreau, studento, Stationstrato 147, Berchem-Antwerp, Belgium.
Marius Roe, Krugerplaco 28, Antwerp, Belgium.

BOHEMIA

- J**osef Dolejš, Havličkova ul. 51, Kolin.
P Sro. Ant. Jos. Ohme, Neidergrund, B. N. B.
Fno. Boska Keyzlarova, Cervený Koatelce, Strato Svato-jukabaka
P Sro. Josef Šupich, Cervený Koatelce, naproti koatelce.
Fno. Marie Prochazkova, Račice, 20, Smirice, Cechy.
V. Stary, Nova Ves, Popavice, Benešov, Praha.
Heinrich Seidlich, stacidomkasisto, Leipa.
Josef Polaczek, Primatorenstr. 601, Prag VIII.
J. Vomačka, Někavcova 1175, Zizkov.
Antono Pelc, Nadrovzi 589, Zamberk
Fno. Libuse Samkova, Praha, Karlin
Josef Jaroslav, Vys Myto, Bohemujo.
Ladie Skorepa, Praha Zizkov, nerudova ul. 33, Bohemujo.
Por poŝtmarkoj sendos koloritajn kartojn Sro. Jaromír Škrivanek, Jičina, Bohemia.
P Sro. Bedrich Douša, Trebenice apud Locasice, (Mezomonte), Bohemia.

BRAZIL.

Ambal Lobo, R. Sacramento, 24, Rio de Janeiro.

BULGARIA

- R**. Kral, str. Ekzarch Joseph 26, Sophia.
Volas korespondi kun ĉiulandaj lertaj terkulturistoj kaj fruktokulturistoj; ankaŭ ŝatus ricevi Esp. Jurnalajn kaj gazetojn de ĉiulandanoj; ĉiam respondo. Zahary Iliev, Soldato, 4a regimento, 4a roto, Plerno, Bulgariujo.
Sro. R. Kral, str. Ekzarch Joseph 26, Sophia, Bulgaria.
P Ivan Nenkov, Sv. gorska 2299, Tirnova, Bulgaria.

CANADA

P H. M. Rayner, Ituna, Saskatchewan.

CHILE

Prof. Louis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, Santiago

DENMARK

Sro. N. Moesgaard, 19 Kirkestrade, Koge.

ENGLAND.

Sro. kaj Fino. Alex, Esperanto Officejo, Burnley, Anglujo, deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj amerikaj landoj kaj kolonioj, per poŝtkartoj montrantaj indianajn aŭ enlandajn tipojn; indianajn balatojn; historion; kutimojn; ludojn; k. c. Ĉiu nepre ricevos respondon.

FRANCE

- P** Jean Drouet, 242 rue St. Jean, Caen, Calvados.
Volas korespondi pri metallaboristoj kaj sindikataj kondiĉoj usonaj Sro. Clement Lefeucre, 150 rue de la Bertiniere, LeMans, Sarthe.
P Sro. Daniel Moreau, Faufourg d' Orleans, Romorantin
P Sro. Joseph Prevost, Rue des Gueniaux, Romorantin
P Sro. Octave Goujon, Rue Nationale, Romorantin
P Sro. Secret, Rue de l' Ecu, Romorantin
P Sro. Lucien Damboise, Grande Rue, Romorantin
P Sro. Fauchon, Grande Rue, Romorantin
P Sino. Sidonie Lecomte, Rue St. Martin Romorantin

GERMANY

P Franz Kviz, Wilhelmstr. 122, Berlin S. W.

HOLLAND

- P** L. Wynschenk, Jan Blankenstraat 70, The Hague.
P C. Koekebacker, Papanstraat 13, Delft.

HUNGARY

Sro. Nagy Jozef, studento de medicino, Budapest VI, Hege-dius Laudor u. 17, III, deziras interŝangi poŝtkartojn ilustritajn kaj poŝtmarkojn.

MEXICO

- S**ro. Francisco Herrera Zambrano, Banco National de Mexico, Leon, Gto., Mexico.
Sro. Wencelas Rodriguez, L. y Cos. 19, Vera Cruz, Mexico

ROUMANIA.

- P** Sro. S. Miluta, presisto, Str., Colonel Ghica No. 49, Bukaresto.
P Sro. D. Trestloreaanu, Str. Viitor No. 91, Bukaresto.
P Isidor Steinfeld, Stg. Faurari 27, Bukaresto.

RUSSIA

- A**. Sudakevich, Moskvo, Povarskaja, Borysgolelskyj per domo N. 14, loĝ. 15.
Volas korespondi kun esperantistoj pri fando de "Tutmonda Kristana Studenta Ligo" Ivan Ivanoviĉ Aleksejev, Semakaja Bolnica, Bogorodsk, Moskvo gub., Russia.
Eugen Vojnovski, Censtohor, Piotrkovska Gubernio, Polujo, Rusujo.
Sro. B. Samsonov, M. Kozihinskij 4, Moscow, Russia, deziras interŝangi poŝtkartojn kaj markojn.

SERVIA

- P** Isailo Venadoviĉ, 9 Zeleni venac, Belgrade, Servia, interŝangas kartojn nacikostumajn.
Siniša Budjevac, Brankova 19, Belgrade.

SPAIN

- S**roj. Joaquin Adau, Jose Elezcano, kaj Toustino Sabio, Jardines 7, Bilbao.
Por uzitaj poŝtmarkoj sendoj kartojn aŭ poŝtmarkojn A. Carreno, strato Volantin 9, Bilbao.
P Francisko Zarzoza, Elcano 3, Bilbao.
P Arturo Leicht, Plauen, Vogtl, Carolastr. 35
P Sro. H. Wuttke, Pionierstr 21, Magdeburg, Germany, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kaj interŝangi uzitajn poŝtmarkojn.
K.hard Sauren, (akvarelpentristo), Heros 6, Bilbao.
P Jose Lopez, Ybarro Hermanos, Bilbao.
Sains Ignacio Argueso, San Ignacio 6, Sestao, Vizcaya.
Juan Ginesta, Strato Paradia, 12, (E. K.) Barcelona.
Miguel Guifart, Calle S. Pedro del Taulat, No. 67 (bis), l'c. 2a, Barcelona.
P Fino. Domingo Cabornero, Ascao-22-tienda, Bilbao, Spain.

Weis CONCENTRATED FILING SYSTEMS

Nine different kinds of drawers are made for the Weis Desks and Weis Filing Cabinets shown here. You can combine in either just the ones you need—vertical letter files, document drawers, catalog files, card indexes, check files, etc. Your filing capacity is thus varied, yet compact. Solid Oak, Roller Bearings and Dust Proof Construction make these wonderful values, as your dealer will tell you. We will ship direct if he will not supply you.

WE PREPAY FREIGHT

at these prices, to all points in the U. S. east of Mont., Wyo., Colo., Okla. and Texas. In these states and beyond add 15 per cent.



Weis
Weis
Weis

Four Drawer Vertical Letter File No. 421, for correspondence only, holds 20,000 letters, freight paid..... **\$13.25**
Combination Vertical File and Card Index, No. 425 (15,000 letters and 8,000 cards), freight paid..... **\$16.75**
Flat-Top Desk, No. 355, "A Complete Office on Legs," your choice of drawers, freight paid..... **\$22.00**

Get Posted on these and other Weis Business Conveniences. See a dealer or a catalog. Let us send you some valuable hints for saving office space and time.



The *Weis* Mfg. Co., 147 Union St., Monroe, Mich.

SWEDEN

H. Haroldson, 14 Badstrugatan So., Stockholm.
Ragnar Olsson, Braunkurkogatan 56, Stockholm.

TURKEY

Solon Orfanidis kaj John Mathendakis treege deziras negocadi kun amerikaj negocistoj, pri eksportoj. Adreso: Aidin, Turkujo.
Sro. Solon Orfanides, caissier, Ce Regie des Tabacs, Aidin via Smyrna, Turkey, volas korespondi nur letere kun esonaj gesamideanoj (angle, esperante, turke, france kaj greke).

SUDA LERNEJO DE ESPERANTO, ANGLA LINGVO, PENTRARTO, Muziko kaj la Dramo. Loĝadon laŭvole, aŭ instruadon sen loĝado. Instruadon ankaŭ per korespondado. Siosifo por esperanta prononcado kaj konversacio, dek cendoj. Evitu la nordan vinturon en bela Savannah. Sin turni al la Sro. E. Esther Owen, 328 Barnard St., Savannah, Georgia, U. S. A.

THE FIRST PRINTING OFFICE in the U. S. to be equipped for Esperanto printing solicits work in either English or Esperanto. Anything from a card to a dictionary will receive prompt and careful attention. Estimates cheerfully furnished and advice if required. All work under the direct supervision of an expert Esperantist. (A. E. A. 167). Send 2c stamp for leaflet *Cu Esperanto Vivos?* giving specimen of work and further details. Ernest F. Dow, West Newton Station, Boston, Mass.

Phonograph Bargain

We have a \$20.00 Columbia Graphophone used only a little for testing records in our office. We will sell this machine for \$15.00 and include a set of eight records of Esperanto text from the American Esperanto Book, or any other Esperanto matter furnished by purchaser. Six persons ordered our typewriter bargain offered here some time ago. Of course the first got it, and he was as pleased as you will be if your \$15.00 check for this phonograph and records reaches Chicago ahead of the others.

SAMIDEANO ĈIUMONATA

Internacia Ilustrata Esperanta Revuo. Redaktata de Eminentaj Okeidentuloj kaj Orientuloj, por literaturo, belarto, scienco, familia legilo, industrio, ktp., kun aldono de

BELEGE KOLORIGITA ORIGINALA KSILOGRAFIA

PENTRAĴO.

(37 x 25 cm.) sur luksa papero per Speciala Japana Presarto.

Jara abono, \$1.35; unu numero, 12c.

Abonpago per poŝt mandato aŭ mono.

Sin turni al Verda Stelo & Co., (Sro.) M. Hikosaka. 33 Abekawamachi, Asakusa, Tokio, Japanujo.

SPEAK ANOTHER LANGUAGE

ENGLISH · GERMAN · FRENCH
ITALIAN · SPANISH

CORTINAPHONE

"The Original Phonographic Method"
Awarded Medals—Chicago 1893, Buffalo 1901
"Most sensible plan to acquire languages." Clear-est and most progressive method ever published."
Such is the testimony of thousands who have used the Cortinaphone Method of Language study. It enables anyone to learn any language in the easiest, simplest, most natural way. No costly native teacher, no loss of time from regular work, no drudgery.
The Cortinaphone Method makes language study a pleasure and at the same time gives you a practical speaking knowledge. You learn to speak and understand a foreign tongue as you learned your own language, by listening to it. It is the
IDEAL HOMESTUDY METHOD
Always ready when you have a few moments to spare. It is endorsed by the ablest teachers and philologists of the world.

Records Furnished in Any Language
Largest collection of language master records in all tongues. Our free booklet tells all about the Cortinaphone Method; also our easy payment plan. Write for it today.



CORTINAPHONE

CORTINA ACADEMY OF LANGUAGE.
217 Cortina Bldg.
44 W. 34th St.,
New York.

The Fifty-Cent Price on This Combination Is Withdrawn. The Cards in Fives or More Are Sold at .45 each.

\$.60

SUBSCRIPTION CARD

\$.60

THIS CARD IS GOOD FOR

AMERIKA ESPERANTISTO

SIX MONTHS and

THE AMERICAN ESPERANTO BOOK
PREMIUM PAPER EDITION

NAME OF SUBSCRIBER

STREET OR ROUTE

TOWN AND STATE

ISSUED TO

BY

MAKE YOUR WORK PERMANENT

YOU know that not everybody who buys an Esperanto book or who attends a class learns the language. You also know that not everybody who learns it makes use of it.

This is perfectly simple, and equally true of any other language, and almost any other study.

We have sold thousands of books without the magazine, *Amerika Esperantisto*. We have sold thousands of magazine subscriptions, with books. Careful comparison of results proves that proportionately TEN TIMES AS MANY become real Esperantists if they take the magazine at first.

It is all very simple—the magazine comes along twelve times in a year and reminds the subscriber to study, it presents additional INCENTIVES for him to perfect his knowledge of Esperanto.

Yet, in the face of this overwhelming, preponderant ADVANTAGE which the magazine offers, there are many teachers and clubs which neglect to use it. Some say they must make the initial expense very light. Lighter than forty-five cents? That's the lowest clubbing price for the magazine and American Esperanto Book.

These Cards Will Be Good at Any Time. Buy Five or More at
.75 each. Shall We Send You the Premium Books?

\$1.00

SUBSCRIPTION CARD

\$1.00

THIS CARD IS GOOD FOR

AMERIKA ESPERANTISTO
ONE YEAR and
THE AMERICAN ESPERANTO BOOK
PREMIUM PAPER EDITION

NAME OF SUBSCRIBER

STREET OR ROUTE

TOWN AND STATE

ISSUED TO

BY

Buy Five or More of These Cards at \$1.20 each. We Will
Deliver the Books to You or Mail Direct to Subscribers?

\$1.50

SUBSCRIPTION CARD

\$1.50

THIS CARD IS GOOD FOR

AMERIKA ESPERANTISTO
ONE YEAR and
THE AMERICAN ESPERANTO BOOK
BEST CLOTH EDITION

NAME OF SUBSCRIBER

STREET OR ROUTE

TOWN AND STATE

ISSUED TO

BY